

Ora Ĵurnalo

Numero 47, Januaro 2022



Ni lumigas niajn domojn kiam la vintro regas.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	La sonĝo de ridinda homo	18
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Blankaj noktoj de Dostojevskij kun sezona rabato	20
Espeporko meditas: "2022 – Nova jaro, nova espero!"	3	Nova senpaga libro: Kvin rakontoj de Dostojevskij.....	20
Novjaraj hajkoj	3	"Malbono ne estas ĉiopova" – "Ondskan är inte allsmäktig"	21
La Wijk-domo – Wijkska Huset.....	4	La artklubo en la Konstruelementa uzino – Konstklubben på Elementfabriken	22
Propono pri nova tradicio en Gotenburgo.....	6	Galerio Mona Huss Walin	24
Kompreneble!	6	Christin rakontis pri sia hundo Tina	26
Sentenco de la saĝa strigo.....	6	La flutisto de Hameleno.....	33
Vintraĵ bildoj el Finnlando	7	Binara horloĝo	34
Vintro en mia urbo Panevežis, Litovio	8	Pri Moresnet	35
El Brazilo venas la jena julkanto.....	9	Spritaĵoj el la jaro 1904	35
Jarfinaj salutoj el Samarkando	9	Tradicioj ĉe la Nova Jaro – Nyårstraditioner.....	36
Junuloj de la grupo "JES-eroj" – vizitis Gotenburgon.....	10	Internacia Esperanto-Sonorilo – Pacsonorilo.....	42
La librorondo pri "Sesdek ok" de Sten Johansson.....	11	Lottie kaj Davido tendumas en norda Kanado, parto 2	43
La plej bona libro de Spomenka Štimatec, laŭ Sten Johansson.....	11	Rezulto de la skriba konkurso de Ora Ĵurnalo.....	46
Rubekolo – Rödhaken	13	Internacia literatura Esperanta konkurso....	47
Rubena najtingalo – Rubinnäktergal	14	Vintra lago – Vintersjö	47
Sveda kalendaro por 2022 – en Aŭstrio! Mi miras!	14		
Paĝo el la kalendaro	16		
Dostojevskij.....	16		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com.
Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato.



Vizitantoj en la biblioteko, legu pli en p 10.

Espeporko meditas: "2022 – Nova jaro, nova espero!"



- ☆ La tradicioj diversas de lando al lando, sed iel **la nova jaro estas festata** ĉie, tamen eble ne en la sama dato.
- ☆ La bildo sur la unua paĝo **montras la domon de la familio Wijk**, unu el la multinfluaĵaj gotenburgaj familioj.
- ☆ Ekde la 29a de decembro ĝis la 2a de januaro kelkaj junuloj loĝis en la junularejo de Slottsskogen, Gotenburgo. Ĉu la semo de nova SEJU?? Ili nomiĝas **JES-eroj**. La novjaran tagon kvar el ili uzis por viziti la esperanto-bibliotekon en Stannum. Mi vere ŝatas tiajn interesajn vizitantojn.
- ☆ La Libro-rondo pri "Sesdek ok" finiĝos en marto. Tiam la verkisto, Sten Johansson, partoprenos, kaj ni povos meti demandojn al li. **La nova Libro-rondo komenciĝos en aprilo**. La nova libro nomiĝas **"Ombroj sur interna pejzaĝo"** de Spomenka Ŝtimec. **Ni bonvenigas novajn partoprenantojn**.
- ☆ Ĉu vi rimarkis, ke birdoj kaj hundoj ofte estas videblaj en Ora Ĵurnalo. Jes, niaj bestaj kunuloj meritas atenton. Nun ankaŭ **strigo** ĉeestas, dirante saĝajn sentencojn.
- ☆ **Fjodor Dostojevskij** estas verkisto, kies nomon ĉiu konas, sed kies verkojn tro malmultaj legis. Toben Svendsen, Danio, volas popularigi ĉi tiun faman verkiston, kaj UEA ofertas lian libron "Blankaj noktoj" kun sezonrabato.
- ☆ El Belorusio venas la ruslingva poeto Dmitry Strotsev. Li gajnis **la Tucholsky-premion** pro sia laboro por sinesprimlibereco. Kalle Kniivilä skribis pri li en Svenska Dagbladet.
- ☆ La **irlanda lingvo** nun estas oficiala lingvo en EU. Ĝi estas la ĉefa lingvo de Irlando. Do, nun estas 27 ŝtatoj kaj 24 lingvoj en EU. Kiam eniros Esperanto?
- ☆ Koloroj nepras en ĉi tiu griza januaro. Ĝuu la galerion de la gotenburga pentristino **Mona Huss Walin**, pri kiu Ingegerd skribis.
- ☆ La tagoj nun longiĝos kaj la lumo revenas. Pri tio la **digitala horloĝo** de Lasse ne zorgas. Kiam mi nun skribas, la sunbrilo enfluas en la ĉambron, kaj mia altmoderna horloĝo ridas per siaj montriloj: dek minutojn post la deka.
- ☆ **Bonan 2022** mi deziras al vi! /Siv

Novjaraj hajkoj

Novjara tago –
la ĉielo estas sennuba
la paseroj konversacias



Ransetsu

La unuan sonĝon de la jaro
mi faras al mia sekreto
kaj nur ridetas

Shō-u

La Wijk-domo – Wijkska Huset

”La familio, kiu riĉiĝis per najloj” – ”Familjen Wijk som blev rik på spik”

De Ingegerd Granat



La adreso ”Lilla Torget 1” estis konstruita jam en la 17-a jarcento. Tiam staris tie unu el la unuaj ŝtonaj domoj de Gotenburgo. Ĝi estis nomita ”Utfallska huset”. Ĝi estis granda trietaĝa domo kun kruta tegmento, granda portalo kaj ŝtuparo al strato Södra Hamngatan.

Ĉe la fino de la 18-a jarcento, Niklas Sahlgren posedis tiun domon. En 1772, reĝo Gustaf III vizitis ”Utfallska huset” dum sia ”Eriksgata”.*

Pensu pri kiaj konversacioj devis okazi sub ĉi tiu kruta tegmento.

Potencaj voĉoj, servistoj, kelkaj de la Orientinda Kompanio, eble eĉ iu superkargo, kiu volis fari bonan negocon post iu vojaĝo. Ne laste, kelkaj tasoj verŝajne estis svingitaj sub la kruta tegmento.

En multaj partoj de la urbo regis severaj vivkondiĉoj. Malriĉeco kaj malsano, krimo kaj adulto.

Adresen ”Lilla Torget 1” bebyggdes redan under 1600-talet. Då stod ett av Göteborgs första stenhus där. Det hette ”Utfallska huset”. Det var ett stort trevåningshus med brant tak, stor portal och en trappa ut mot Södra Hamngatan.

I slutet av 1700-talet ägde Niklas Sahlgren detta hus. År 1772 gästade kung Gustaf III på sin Eriksgata det Utfallska huset.

Tänk vilka samtal som måste ha utspelat sig under detta branta tak.

Mäktiga röster, tjänstefolk, en och annan från Ostindiska Kompaniet, kanske rent av någon supercargör som ville göra en bra affär efter någon resa. Inte minst svingades nog ett flertal bägare under det branta taket.

På många håll i staden rådde hårda levnadsvillkor. Fattigdom och sjukdom, brottslighet och skörlevnad. Utfallska huset gick i alla fall upp i rök vid den stora stadsbranden 1804 och det dröjde ända fram

Ĉiukaze, la "Utfalls-domo" ekbruliĝis dum la granda urba fajro de 1804 kaj daŭris ĝis 1853 antaŭ ol la nuna domo estis preta. Olof Wijk, la pli maljuna, konstruis, Viktor Gegerfelt dezajnis.

Olof Wijk tiam estis granda entreprenisto en Göteborg kaj ankaŭ liaj posteuloj, estis tiaj. Krome pluraj el ili havis respondecajn konfidajn poziciojn por skribi en siaj meritlistoj. La grandioza posedaĵo apartenis al la familio Wijk dum 70 jaroj antaŭ ol ĝi estis vendita kiel oficejo.

Olof Wijk la pli maljuna/d.ä. 1786–1856



Hodiaŭ oni povas reĝe festi ĉe "Fiskekrogen" se oni ŝatus festi ion specialan, ekzemple la 400-an datrevenon de Gotenburgo. Eble estas iu feste kuirita omaro kaj kial oni ne ĝuu de soldo Walevska? Por sekureco, kunportu vian grandan monujon. /Ingegerd

*) Rondvojaĝo de nova sveda reĝo tra la regno.



*La familia tombo ĉe la Orienta Tombejo
Familjegraven på Östra Kyrkogården i Göteborg*

till år 1853 innan det nuvarande huset stod på plats. Olof Wijk d.ä. byggde, Viktor Gegerfelt ritade.

Olof Wijk var en stor entreprenör i Göteborg då och det var hans efterföljare också. Dessutom hade flera av dem ansvarsfulla förtroendeuppdrag att skriva in i sina CV:n. Den pampiga fastigheten tillhörde familjen Wijk i 70 år innan den såldes som kontor.

Olof Wijk la pli juna/d.y. 1833–1901



Idag kan man fira kungligt på "Fiskekrogen" om man skulle vilja fira något speciellt, till exempel Göteborgs 400-års jubileum. Kanske finns det någon festligt tillagad hummer och varför skulle man inte hoppas på en sjötunga Walevska att njuta av? För säkerhets skull, tag med den stora plånboken. /Ingegerd

Propono pri nova tradicio en Gotenburgo

(el Göteborgs-Posten)



Gävle, urbo en Norrlando, Svedio, estas konata pro sia jula virkapro farita el pajlo. Ĉiun decembron ĝi estas novkonstruita kaj ĉiun jaron homoj klopodas forbruligi ĝin.

Se tio ĉi ne okazus, la virkapro ne estus tiel konata. Gotenburgano proponis, ke ankaŭ Gotenburgo havu pajlan beston kaj plej tipa estus krei pajlan salikokon. Tipaj gotenburgaj pladoj enhavas bestojn el la maro, kaj la salikoko estas tre populara.

Ano de la Kosmologio de Martinus estis demandita kial li ne manĝas salikokojn.

Li respondis: "Mia respekto por ĉiuj vivantaj bestoj igas min kontraŭstari mortigon de bestoj. Oni prefere ludu kun ili!"

– Kiel oni ludu kun salikokoj?????


/Siv



Kompreneble!

– Kiel oni scias ke estis tri viraj magoj, kiuj vizitis la Kristinfanon?

– Se estus virinoj, ili neniam kunportus tiajn stultaĵojn kiel oron, odorfumon kaj mirhon. Ili kunportus vindotukojn, varmajn kovrilojn kaj iun frandaĵon por Maria.



Sentenco de la saĝa strigo

Espero por la lingvo Esperanto:

La guto erodas la ŝtonon. Ne per forto, sed per ofta falado.

Vintraj bildoj el Finnlando

Raita Pyhälä sendis ilin



Vintro en mia urbo Panevežis, Litovio

De Vida Kulikauskiene, prezidantino de Panevežisa Esperanto klubo "REVO"

Dum la plej belaj vintraj festoj, kiuj okazas dum la plej malluma periodo de la jaro, ĉiu sopiras pri heleco, varmece. Eble tial ni ornamas nian ĉirkaŭaĵon per multaj lumoj? Kiam helpas naturo per blankeco de neĝo, en koro aperas duobla festa ĝojo.

Mia urbo Panevežis dum la lastaj du jaroj pli kaj pli renoviĝas, plibeliĝas. Do, ankaŭ


kristnaska periodo fariĝas pli kaj pli bela, hela kaj esperoplena.

Ĝuu la ornamaĵojn! Alportu ilin al viaj koroj – varmecon, inspiron kaj kredon, ke la Nova jaro 2022 estu plena da sano, sukceso, helaj pensoj kaj belaj revoj. Estu feliĉaj!

La bildoj estas faritaj de Gediminas Kartanas



El Brazilo venas la jena julkanto



Venas oldulino, Kvaropo Sinkopo, https://www.youtube.com/watch?v=_70m0mrLBKo&list=PLDA83BB4952E80D52

Venas oldulino
Kun la mondonaco
Ŝi ĝin trovas troa
Jam deprenis parton

*Vinbera branĉeto
Citrona foli'
Kaj Sankta Maria
Patrino de Di'*

Venas la Tri Magoj
Vice al la stalo
Kun Incenso, Oro
Mirho kaj Santalo

*Vinbera branĉeto
Citrona foli'
Kaj Sankta Maria
Patrino de Di'*

Jarfinaj salutoj el Samarkando



Karaj geamikoj,

Dum finiĝas la 2021-a, ni deziras al vi belan kaj agrablan festan sezonon. Vi kaj ĉiuj viaj proksimuloj ĝuu bonan sanon malgraŭ la pandemio, ĉio iru glate en via vivo kaj en la mondo ĝenerale!

Sekuran kaj Esperoplenan, Brilan kaj Kreivan, Sanoriĉan kaj Felician Novan Jaron!

Ni esperu, ke la alvenanta 2022-a alportos al

ni bonajn novaĵojn kaj la finon de ĉi tiu stranga epizodo de homa historio.

*Amikajn bondeziraĵojn,
Anatolij*

Enciklopedia projekto "Samarkandiana"
P.O. Box 76
UZ-140100 Samarkando
Uzbekio
imps86@yahoo.com

Junuloj de la grupo "JES-eroj" – vizitis Gotenburgon



de la 29a de decembro ĝis la 2a de januaro. Eble la semo de nova SEJU??? Ili loĝis en la Junulargastejo de Slottsskogen kaj festis la Novjaron kune kun gotenburganoj ekstere en la centro. Unu tagon ili estis sur kelkaj insuloj en la arkipelago. La novjaron tagon ili pasigis en Gråbo ekster Gotenburgo. Per aŭtobuso ili venis al la esperanta biblioteko de Stannum.

La planita grupo origine estis pli granda, sed pro malsano kaj aliaj obstakloj ne ĉiuj povis veni.

De maldekstre: Frank el Nederlando, Tobias kaj Svend el Danio kaj Ingrid el Sundsvall. Du junuloj el la gotenburga klubo bedaŭrinde ne ĉeestis, sed ili ja havos pliajn eblecojn.

Fakte mi ne ofte havis tiom interesajn vizitantojn en la biblioteko. Ili trovis multon por diskuti. Poste ni iris al mia hejmo – tri kilometrojn fore – kaj la babilado daŭriĝis. Ĉiuj parolis Esperanton tre flue.

Por mi estis bona okazo paroli pri la Gotenburga klubo, pri gotenburgaj esperantistoj, pri la historio de la biblioteko kaj – kompreneble pri Ora Ĵurnalo. /Siv



La librorondo pri "Sesdek ok" de Sten Johansson

finiĝos en marto kaj ni serĉas novan libron. Andreas proponis "Ombro sur interna pejzaĝo" de Spomenka Ŝtimec.


Hazarde mi trovis recenzon pri ĉi tiu libro skribita de Sten Johansson. Certe tio garantios, ke la libro donos al ni kialojn por diskuti – same kiel faris "Sesdek ok".

Do, ni (ĉefe gotenburganoj 😊) decidis elekti "Ombro sur interna pejzaĝo".

Ni bonvenigas ankaŭ novajn partoprenantojn! Anoncu vin **tuj** al iu en la redakcio de Ora Ĵurnalo! La telefonnumerojn vi trovas komence de la magazino. Oni bezonas tempon por havigi al si la librojn! La ĉiumonataj renkontoj okazas rete per Zoom.

Ombro sur interna pejzaĝo de Spomenka Ŝtimec.
Pizo, Edistudio, 1984. 142p. Intima aŭtobiografia romano. Mendebila ĉe UEA:

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?retrovo=ombro+sur+interna&kondicho=havata&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>



La plej bona libro de Spomenka Ŝtimec, laŭ Sten Johansson

En la Esperanta originala literaturo abundas verkoj, kie la aŭtoro uzas sian plenan imagpovon por rakonti nenion pri si mem, nenion el siaj spertoj aŭ sentoj, kaj nenion pri la reala vivo, ofte kaŝante ĉi vakuon sub komplika intrigo kaj vepra lingvaĵo. Kompreneble, fojfoje tamen io el la vivo likiĝas inter la linioj. Sed la surfaco preskaŭ ĉiam estas fantazia. Krimromanoj, fantastaj romanoj, sciencfikcio, utopioj, distraĵoj, filozofiumado, fabeloj kaj epopeoj.

Kiam aperis en 1984 *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka Ŝtimec, ĝi estis alia. Tre alia. Ĝi estis verko vera, kiu povus aperi en nacia literaturo. Persona, senŝminke sincera rakonto el la privata vivo de iu "mi". Ne gravas, ĉu tiu "mi" identas aŭ similas al la aŭtorino. Gravas la verko, kiun ŝi kreis, kaj ĝi estas granda artaĵo rava, pentrita per simplaj rimedoj – almenaŭ ŝajne simplaj.

Rapide la romano famiĝis inter legantaj esperantistoj, kaj hodiaŭ (en 2001) ĝi estas sendiskute unu el la mejloŝtonoj de la Esperanta literaturo.

Ombro sur interna pejzaĝo estas romano pri amrilato, sed ĝi komenciĝas je tiu momento, kiam la amo finiĝis – almenaŭ unuflanke, ĉe la alia, la kunulo. Ĝia temo estas la iom-post-ioma fado de la kuneco, kaj la klopodoj de la protagonistino al kutimiĝi, akcepti aŭ malakcepti, elteni, la staton de eksulino. La aŭtorino plenumas tion en tia majstra maniero, ke ĉiu homo, kiu iam trovis sin ies eksulo, devas rekoni la sentojn, la reagojn, la agojn. Kaj tamen ni ne povus eldiri ilin, ĉiuokaze ne tiel bele! La talento de Spomenka Ŝtimec estas trovi ĝuste la plej trafajn kaj unike signifoportajn detalojn el miloj da bagateloj en la ĉiutaga vivo, konkretajn detalojn, kiuj vivigas la sentojn de la leganto pli ol mil senvivaj vortoj.

Spertu ekzemple, kiel ŝi igas la hejmajn objektojn atesti pri la ekskuneco:

Inter lia foriro kaj mia solseno la nokto ekkonstruis sian unuan matenon. Mi revenas litten. La polmo metita subvangan por doni falsan impreson, ke iu ĝin varmigas. Mensogo! Tio estas mi! Mi mem!

Diskrete mallumigi la lampon! Neniu movo por ne veki la triston, kiu laca endormiĝis.

Mateno grizigas la ĉambron. Li kutimis fermi ŝutrojn, mi ne. Tial nun la mateno aperas frue kaj grize kolorigas leviĝon.

– Vi devas mem fermadi ŝutrojn ĉiuvespere! – komentis la voĉo aferece.

Ankaŭ la medio de la romano estas malofta en la Esperanta literaturo – la nuntempo, la ĉiutaga vivo de veraj, normalaj homoj. La fakto, ke ĝi okazas meze de Esperantio, en plurnacia esperantista medio, kompreneble alportas plian valoron. Ĝi ja temas pri ni, kiuj renkontiĝas en kongresoj kaj festivaloj, enamiĝas, korespondas, klopodas kunvivi, elreviĝas...

Tra la verko regas tono de humanismo, kiun oni rekonas el aliaj verkoj, kiel la natura, propra sinteno de la aŭtoro. Al ĉiuj personoj en la verko, ankaŭ al la "mi", la aŭtoro estas senflata sed ne senkompata. Al mi profunde impresis la suba epizodo, memoro el la feliĉa tempo, kiam la paro ankoraŭ ne estis eksparo. Sed ankaŭ tiam troviĝis eksulino – alia virino – kaj jen sentu la vibrojn de ĵaluzo, kulpo, antaŭtimo kaj – kolegineco:

Kiam mi alvenis liaurben li diris ke mi konatiĝos kun lia eksedzino. Mi ne tro scivolemis. Ial mi fartis malkomforte. Mi preferus vidi ŝin de malproksime por ne devi paroli kun ŝi. [...]

– Ĉu vi volas ke ni vizitu ŝin hodiaŭ? – li demandis iun posttagmezon. Li ne diris ŝin, li

uzis ŝian nomon. Mi preferus diri ne, sed mi akceptis. Ĝi iam okazu. Mi atendis dum li laĉis siajn ŝuojn. La laĉado ne longe daŭris. Mi ekdeziris ke ŝi ne estu hejme. [...]

Kiel impresas renkonti sian eksedzinon?

Ĉu dum konversacio ne enŝteliĝas ilia unua supo el poreo, komune kuirita iun foran posttagmezon? Tiu supo kaj tiu posttagmezo apartenas nur al ili. Neniu povas ĝin kundividi. La fakto, ke mi ĝin enkapigis, estis nur vana klopodo, eniri ilian vivon antaŭ ol en ĝi estis mi. [...]

Mi pensas pri tio kiom da fojoj Jan malfermadis konservaĵojn por ŝi. Vespermanĝo. Oni serĉas pri iu neŭtrala temo kaj trovas ĝin.

La lingvaĵo de Ŝtimec estas tre simpla, sed riĉa je valoroj. El ĉiuj Esperanto-verkistoj, ŝi estas tiu, kiu kapablas eldiri plej multe per la plej simplaj rimedoj. Male al tro da aliaj, ŝi esence ne verkas per vortoj, sed per imagoj, situacioj, agoj, kiujn ŝi vestas per la plej proksime troveblaj vortoj – almenaŭ tiel ŝajnas. Kredeble la vero estas pli komplika. Kelkaj el la ĉapitroj de *Ombro...* estas reciklitaj noveloj, kiuj aperis ankaŭ en pli frua versio en la novelaro *Vojaĝo al disiĝo* (kiu tamen eldoniĝis pli malfrue, laŭ la lama logiko de Esperanta eldonado). Do, ni povas kompari la lingvaĵon de tiuj du versioj, kaj konstati, ke efektive Spomenka Ŝtimec poluris sian lingvaĵon, kiu jam komence ja estis bela. Do, kiel ĉe multaj grandaj artistoj, ankaŭ ĉe ŝi eble la simpleco ne estas tiel simpla afero!

[...] Sed nedubeble la plej bona verko en tiu kampo ankoraŭ restas *Ombro sur interna pejzaĝo*. [...]

Sten JOHANSSON

Rubekolo – Rödshaken

de Renate Säfström



Kvieta sankta nokto
La stelo brilis nekutime hele
La kristnaska mateno ekestas.

Tie ekster la fenestro
en frostmordita pomarbo
la Rubekulo sidas, kvieta kaj silenta.

Vi restis
spite de malvarmo kiu volis paralizi.
Flugis tute proksime, plukis la dornon
tiel ke la sangoguto trafis vin.

Markita por ĉiam
vi ekestis paseroforma birdo
kun oranĝkolora brusto
kaj kreas nian sopiron al printempo
denove eblas aŭskulti ĉielan kanton.

(inspirita de Selma Lagerlöf, Kristaj
legendoj, pri kiel la rubekulo ricevis
sian nomon)

Ingegerd tradukis

En stilla och helig natt
Stjärnan lyste ovanligt klart
Juldagsmorgonen är här.

Där utanför fönstret
i ett frostnupet äppelträd
sitter Rödshaken stilla och tyst.

Du stannade kvar
trots kylan som ville förlama.
Flög helt nära, plockade taggen
och blodsdroppen träffade dig.

Märkt för alltid
du blev en tätting
med orangerött bröst
och föder vår längtan till våren
att åter få lyssna till himmelsk sång.

(inspiration av Selma Lagerlöfs
Kristuslegender om hur rödhaken fick sitt
namn)

/Renate

Rubena najtingalo – Rubinnäktergal

La birdo kovas idojn de Siberio kaj oriente ĝis Japanio. Vintre ĝi moviĝas al Sudorienta Azio. Ĝi estas timema kaj restas plejparte kaŝita.

Vivas de insektoj. La unua trovo en Svedio estis en Skoghall 2018. La dua trovo 15 novembro 2021 en Vargön. Tiam Leif Eriksson promenante malkovris ĝin en heĝo de la najbaro. Ekde tiam birdobservantoj de proksime kaj malproksime iras al Vargön por vidi la belan birdon, kiu nun estas nutrata per farunvermoj



de tri homoj. Dum vizito tie en decembro mi parolis kun anglo, kiu flugis el Londono nur por vidi ĉi tiun maloftecon. Vespere li intencis flugi hejmen kun Ryanair. Unu Leif Eriksson ja malkovris Amerikon, sed Leif Eriksson en Vargön diris al mi, ke li opinias, ke la birda malkovro estas pli granda.

/Jan Hellström, fotis 5/1 2022

Fågeln häckar i Sibirien och österut till Japan. Vintertid flyttar den till Sydostasien. Den är skygg och håller sig mest dold. Lever på

insekter. Det första fyndet i Sverige av den var i Skoghall 2018. Det andra fyndet den 15 november 2021 i Vargön. Då var Leif Eriksson ute på en promenad och upptäckte den i grannens häck. Sedan dess har fågelskådare från när och fjärran varit i Vargön för att få se den vackra fågeln som nu matas med mjölmaskar av tre

personer. Vid ett besök där i december talade jag med en engelsman som kommit med flyg från London just för att få se denna raritet. På kvällen skulle han flyga hem igen med Ryanair. En namne till Leif Eriksson upptäckte Amerika, men Leif Eriksson i Vargön sa till mig att han tyckte fågelupptäckten var större.

/Jan Hellström, foto från 5/1 2022

Sveda kalendaro por 2022 – en Aŭstrio! Mi miras!

Tipa ruĝa domo en la fono!

Ĉu vi scias kial tiom da svedaj domoj havas ruĝan koloron? Bv. Legi!

La Svedio, kiun ni hodiaŭ konas, havas multon por danki al la minejo de Falun.

Kupro estis elrompita en la minejo dum pli ol mil jaroj, antaŭ ol ĝi estis fermita.

Dum multaj jaroj la Falu-minejo estis unu el la plej grandaj industrioj de Eŭropo. Kaj sukcesa industrio ofertas grandajn avantaĝojn. La plej

Det Sverige vi känner i dag har mycket att tacka Falu Gruva för.

I gruvan hade det brutits koppar i över tusen år innan den stängdes.



bonaj inĝenieroj kaj aliaj fakuloj de Eŭropo alportis sian kompetentecon al la Falu-minejo.

La inĝenieroj ankaŭ kreis multkulturan laborejon, interŝanĝon, kie scio kaj kulturo de la resto de Eŭropo estis utiligitaj kaj plibonigis la minejon kaj Svedion. Sen la minejo, Svedio verŝajne neniam havus la epokon de grandpotenco.

Sed de la minejo ni ne nur ricevis la svedan grandpotencan epokon, ni havas ion, kion ni ankoraŭ uzas hodiaŭ. Io, kiu neniam ĉesis esti moderna. Ĉe Falu-minejo naskiĝas la Ruĝa farbo de Falun, la koloro kiu estis ornamonta la tutan Svedion.

En la 16-a jarcento, la sveda reĝo volis, ke la tegmento de sia kastelo estu farita el kupro, same kiel la vere grandaj kasteloj en Eŭropo. Sed eĉ la reĝo ne povis pagi kupron por tuta kasteltegmento, do la solvo devis esti pentri la tegmenton per ruĝa farbo el pigmento de Falu Minejo. Ĉiukaze ĝi aspektis preskaŭ kiel kupro.

Kaj post tio, oni komencis ruĝigi partojn de, aŭ tutajn konstruaĵojn por doni la impreson, ke tiuj, kiuj loĝas tie, estas tre riĉaj. Ruĝkoloraj muroj rememoris la brikmurojn, kiujn la svedaj nobeluloj vidis kiam ili vojaĝis ĉirkaŭe en Eŭropo, sed ili ankoraŭ ne povis havigi ajnan brikon.

Dum la 17-a jarcento, multo estis konstruita en Svedio kaj la multekosta ruĝa koloro disvastiĝis en la superaj sociaj klasoj. La reĝo estis granda inspiranto, aŭ influanto en sia tempo. Ĉar kion la reĝo faris, tion la nobelaro volis imiti. Ruĝe pentri estis maniero aserti sian statuson en socio kaj la nobeluloj baldaŭ komencis ruĝe farbi.

La reĝo akiris pli kaj pli da sekvantoj kun la tempo. Por levi ĝian statuson, la eklezio komencis pentri la pastroloĝejojn tiel ke ili aspektu konstruitaj el multekostaj brikoj. Kaj kiam la nobelaro kaj la pastroj komencis ruĝe farbi, la militistaro ne volis malsuperi la aliajn. Tuj altrangaj oficiraj loĝejoj estis ruĝaj. Eĉ la farmetoj de la soldatoj ruĝiĝas kun la tempo.

En la 18-a jarcento, la ruĝa koloro daŭre estis vidita kiel io tre ekskluziva, luksa objekto kiun

Under många år hade Falu Gruva varit en av Europas största industrier. Och en framgångsrik industri ger stora fördelar.

Europas bästa ingenjörer och andra experter kom med sin kompetens till Falu Gruva.

Ingenjörerna skapade också en mångkulturell arbetsplats, ett utbyte där kunskap och kultur från övriga Europa tillvaratogs och förbättrade gruvan och Sverige. Utan la minejo hade Sverige nog aldrig fått någon stormaktstid.

Men från gruvan har vi inte bara fått den svenska stormaktstiden, vi har fått något som vi använder än i dag. Något som aldrig slutat vara modernt. Vid Falu gruva föds Falu Rödfärg, den färg som kommit att pryda hela Sverige.

På 1500-talet ville nämligen den svenska kungen att taket på hans slott skulle vara gjort av koppar, precis som på de riktigt stora slotten i Europa. Men koppar till ett helt slottstak hade inte ens kungen råd med, så lösningen fick bli att färga taket med rödfärg gjord på pigment från Falu Gruva. Det såg ju i alla fall nästan ut som koppar.

Och efter det började man rödfärga delar av eller hela byggnader för att de skulle ge intryck av att de som bodde där var väldigt rika. Rödfärgade väggar påminde nämligen om tegelväggarna som de svenska stormännen sett när de rest runt i Europa, men något tegel hade de ännu inte råd med.

Under 1600-talet byggdes det massor i Sverige och den dyra rödfärgen spred sig i de högre samhällsklasserna. Kungen var en stor inspiratör, eller en influencer i sin tid. För det som kungen gjorde, ville adeln härma. Att måla rött var ett sätt att hävda sin status i samhället och adelsmännen började snart att måla rött. Kungen fick fler och fler följare med tiden. För att lyfta sin status började kyrkan måla prästgårdarna för att de skulle se ut att vara byggda av dyrt tegel. Och när adeln och prästerna börjat måla rött ville ju militären inte vara sämre. Snart var de högt uppsatta befälens bostäder röda. Till och med soldattorpen blir röda med tiden.

nur la riĉuloj povis pagi. Havi ruĝe pentritan domon estis statusa simbolo. Estis do ofte ke la flanko de la domo turniĝanta al la vojo estis ruĝe farbita, precipe se la reĝo devus fari viziton. Tiam la domoj laŭ la tuta ĉefstrato povus esti ruĝe farbitaj, dum la stratetoj kaj muroj direkte al la kortoj estis lasitaj senkoloraj.

Sed je la fino de la 18-a jarcento, la industria produktado de ruĝa farbo komenciĝis ĉe Falu-minejo kaj iĝis eble produkti pli de la farbo. Nun ankaŭ la grandaj kamparanoj komencas ruĝe farbi siajn domojn. La koloro ankaŭ komencis atentigi pro siaj praktikaj propraĵoj, ne nur ĉar ĝi estis bela kaj laŭmoda. La ligno uzita por la domoj simple daŭris pli longe kiam la domo estis pentrita. La 18-a jarcento estis do bona jarcento por la ruĝa koloro, kaj ankaŭ por la tuta Svedio. /Siv

På 1700-talet sågs rödfärgen fortfarande som något väldigt exklusivt, en lyxvara som bara de rika hade råd med. Att ha ett rödmålat hus var en statussymbol. Det var därför vanligt att den sida av huset som vette mot vägen målades röd, speciellt om kungen skulle komma på besök. Då kunde husen längs hela huvudgatan målas röda, medan gränderna och väggarna in mot gårdarna lämnades färglösa.

Men vid slutet av 1700-talet började den industriella tillverkningen av rödfärg vid Falu Gruva och det blev möjligt att producera mer av färgen. Nu börjar också storbönderna att rödmåla sina hus. Färgen började också få uppmärksamhet för sina praktiska egenskaper, inte bara för att den var vacker och trendig. Virket som användes till husen höll helt enkelt längre när huset var målat. 1700-talet var alltså ett bra århundrade för rödfärgen, och också för hela Sverige. /Siv

Paĝo el la kalendaro


Sur Titanic Greta diras: "Glacimonto antaŭ ni!"

Neniu volas kredi ŝin – sed koleriĝas pro ŝia ĝeno de la festo.

Walter Klag sendis la bildojn el la Kalendaro. /Siv




Dostojevskij



Torben Svendsen, Danio, skribas:


Mia ĝenerala impresio estas, ke kelkaj legantoj de la literaturo de Dostojevskij ofte sentas ĝin tro "malluma, trista kaj peza" kun manko de humuro por legi iom pli de lia ampleksa verkaro.

lasence mi komprenas kaj interkonsentas. Sed, se oni iom pacience kaj trankvile provas penetri liajn pensojn kaj sentojn – aperos unika homo kaj interesa verkaro. Kompreneble ofte estas diferenco inter la diversaj nacilingvaj eldonoj – sed ŝajnas al mi, ke tiuj, kiuj nun ekzistas en Esperanto estas bonaj.



La jaro 2021 estas la 200-jara naskiĝ-datreveno de la fama rusa verkisto – Fjodor M. Dostojevskij. Multloke en la mondo oni jam celebris kaj honoris la verkiston kaj lian ampleksan verkaron per teatraĵoj, ekspozicioj, novaj tradukaĵoj, reeldonoj, debatoj ktp.

En Esperanto aperis en 11-11-2021 – Kvin rakontoj, tradukita de Grigorij Arosev kaj Aleksander Korĵenkov. Unu el la interesaj rakontoj i.a. estas La sonĝo de ridinda homo, kiun mi resume pritraktas en la fino de tiu prezento.



Fjodor M. Dostojevskij

(11-11-1821 – 09-02-1881)

– skizo pri lia vivo kaj verkaro

Fjodor M. Dostojevskij estis naskita en Moskvo, 1821. Lia patro Mikhail Andreievittj Dostojevskij (1787 – 1839) apartenis al la nobelaro kaj vivis en geedzeco kun Maria Nechayeva (1819 – 1837). Ili ricevis 8 infanojn – inter ili – Fjodor. Li elkreskis kun siaj gefratoj en teritorio de Mirinskij-hospitalo je Moskvo (malriĉula hospitalo), kie lia patro laboris kiel kuracisto. Kvankam lia patro ankaŭ estis bienmastro, li ne ricevis altan salajron kaj estis la tempo, kie ne ekzistis la nunajn anesteziojn, rimedojn kaj terapi-metodojn.

Jam en sia infaneco, literaturo ludis gravan rolon. Lia patro laŭtlegis ekz. el la Biblio, Homer kaj Cervantes, kaj Fjodor ankaŭ frue legis la verkistojn kiel ekz. A. Puskin kaj F. Schiller. La plej grava libro en la familia hejmo estis la Biblio, kaj ĝi havis signifan rolon por lia posta vivo kaj verkaro.

Estis ŝoko kaj malĝojo por la juna Fjodor, kiam lia patrino Maria, mortis de tuberkulozo en 1837, kaj iom poste en 1839 ankaŭ lia patro Mikhail mortis, en nekonataj cirkonstancoj.

Fjodor Dostojevskij estis edukita kiel inĝeniero en la militista akademio en la urbo Sankt-Peterburgo, kie li loĝis kaj laboris kiel inĝeniera leŭtenanto ĝis la jaro 1844, kiam li demisiis por fari literaturan karieron kiel verkisto.

En 1845 eldoniĝis lia unua romano – Kompatindaj homoj (dane: Stakkels mennesker), kio vekis grandan intereson kaj donis al li bonan agnoskiĝon kaj sukceson. Samtempe li membriĝis al grupeto de politikaj kaj literaturaj intelektuloj – la Petrajevskij-rondo, kun ideoj i.a. pri forigo de la rusa cenzuro kaj novaj sociaj pensoj. En 1849 li estis arestita de la cara sekreta polico, kaj enprizonigita (kiel pluraj el la aliaj grupmembroj) kaj kondamnita al la morto.

Dum la nervostreĉaj momentoj, kiam Dostojevskij staris preĝante sur la ekzekutejo kaj atendis iĝi mortpafita, li ricevis la malŝarĝitan mesaĝon pri sia malkondamno. Vivmomento, kio certe transformis lian postan vivon kaj forte influis liajn vivkonceptojn kaj lian postan verkaron. Sed anstataŭ la mortpuno li estis kondamnita al 10 jarojn en Siberia punlaborejo (ekzilo), sed la ses lastajn punjarojn li tamen faris en deviga militista servo.

Post la finiĝo de lia ekzilo kaj prizoniĝo en 1859, li revenis al la urbo Sankt-Peterburgo, por daŭrigi sian verkistan laboron.

En 1860 Dostojevskij ricevis sian duan literaturan agnoskiĝon, kiam eldoniĝis la romano *La morta domo* – kun enhavo influita de siaj personaj travivaĵoj dum sia ekzilo kaj enprizoniĝo. Estis la enkonduko al liaj sekvaj grandaj verkoj kun analizoj de la psikologio de la krimo kaj la universala religia perspektivo, kiu serioze fiksas lian lokon kiel unu el la plej gravaj verkistoj de la mondliteraturo.

Ĝenerale en lia verkaro, li provas kompreni la homajn kondiĉojn (moralon, amon, veron, malbonon) de la multaj suferoj ligitaj al la vivo. La vivkondiĉoj de malriĉaj kaj senŝirmaj homoj, kiuj vivas en malfacilaj situacioj kaj provas batali por sociala justeco kaj homa digneco. Dostojevskij elĉerpis de siaj travivaĵoj dum la jaroj kiel mortkondamnito kaj kaptito en ekzilo, kiuj forte inspiris lin al skribi kaj analizi pri la esenco de krimo kaj puno en la socio, kaj la moralaj, etikaj konsekvencoj (la malboneco kaj la boneco).

Malgraŭ lia granda artisma kaj aŭtora sukceso, la malhela flanko de lia vivo estis markita de pluraj tragikaj personaj kaj socialaj problemoj. Dostojevskij malbone administris siajn enspezojn, prunteprenis ofte grandajn monsumojn, kaj li – fojon post foje – forludis siajn monojn en kazino- kaj kartludoj. Plurfoje necesis por li lombardi eĉ la plej necesajn havaĵojn, kaj intertempe fuĝi al Okcident-Eŭropo pro siaj ekonomiaj kaj politikaj problemoj.

En 1867 li edziniĝis kun sia sekretario la juna, Anna Grigorjevna Dostojevskaja (1846 – 1918) – naskite Snitkina, kaj ili ricevis 4 infanojn – kaj malgraŭ necerta vivo kun li, ŝi bone zorgis pri lia ekonomio kaj vivis kun li, ĝis lia morto en 1881. Lia mortiĝo kaj entombigo kaŭzigis nacian funebbron en Ruslando.

Krom multaj artikoloj kaj rakontoj en la rusaj periodaĵoj *Grazdanin* kaj *Vremja* (dane: *Tiden*), unu el la plej signifaj romanoj de

Dostojevskij estas i.a. *Krimo kaj puno* (1866), *La idioto* (1886) kaj *Gefratoj Karamazov* (1879–1880), kiuj temis ĝuste pri la kernaj elementoj de liaj travivaĵoj kaj scioj pri filozofio kaj analizoj de la socio kaj psikologio de la krimoj.

La sonĝo de ridinda homo – fantasta rakonto

La interesa rakonto "La sonĝo de ridinda homo" (el Kvin rakontoj) enhavas kvazaŭ koncentraĵon de liaj verkistaj ĉeftemoj kaj persona vivkonfeso. Ĝi estas komparebla kun la fabelo – *La knabineto kun la alumetoj*, de la dana verkisto Hans Christian Andersen (1805–1975).

La rakonto temas pri mezaĝa malriĉa homo loĝanta en luita ĉambro sur kvina etaĝo en malnova apartamento kun aliaj luantoj.

Jam kiam li estis sep-jara knabo, li eksentis sin ridinda, sed ne sciis kial. Poste li studis en la lernejo kaj en la universitato, sed ju pli li studis des pli li esti konvinkita pri sia ridindeco. Same en sia ĉiutaga vivo. Li ĉiam estis tiel orgojla, ke li neniam volis konfesi tion al iu. Lia orgojlo kreskis dum jaroj, kaj ŝajnis al li, ke, se li almenaŭ foje konfesus al iu lian ridindecon, li tuj, dum la sama vespero, frakasus sian kapon per revolvera pafo.

Li kaptis la konvinkon, ke ĉie en la mondo nenio gravis, kaj tute ne gravis, ĉu la mondo ekzistas aŭ nur ŝajne ekzistas. Post vespera vizito ĉe inĝeniera amiko, li promenis hejmen surstrate, kaj subite li rigardis sur la ĉielo etan stelon. La stelo donis al li la ideon mortigi sin mem dum tiu nokte, sed li ne sciis kial. Li fakte decidis fari tion, antaŭ du monatoj, kaj malgraŭ sia malriĉeco, li aĉetis bonegan revolveron kaj ŝargis ĝin la saman vespon. Dum la du monatoj li ĉiunokte revenante hejmen, pensis mortpafi sin mem. Li ĉiam atendis tiun minuton. Kaj nun la stelo

sugestis al li la ideon, kaj li decidis ke tio nepre okazos jam ĉi-nokte.

En malhela vespero surstrate, kiam li rigardis la ĉielon, subite knabino (ĉ. ok-jara aĝo) tiris lian kubuton kaj vokis lin. Ŝi abrupte kriis iujn vortojn, ĉar ŝi tremis de febro kaj estis vestita per malseka robo, kaptuko kaj ŝiritajn ŝuojn – kaj ŝi ekkriis kun abrupta voĉo – ”Panjo, Panjo”!

Mi rigardis al ŝi, kaj iris pluen, sed diris al ŝi – trovu policanon – dum ŝi daŭre kuris, ploris kaj tiris en mia kubuto (maniko). Kvankam ŝi parolis konfuze, mi komprenis, ke ŝia patrino ie estas mortanta aŭ io misa okazis al ili, kaj ŝi kuris por voki iun aŭ trovi ion por helpi la patrinon.

Mi stampfis per la piedo kaj kriis al la knabino, kaj ŝi kriis kun angoro – Sinjoro, bona Sinjoro! kaj ŝi kuris al la alia flanko de la strato, kie mi ekvidetis konturon de homo, kaj ŝi direktis sin al li.

Li iris hejmen al sia ĉambreto sur kvina etaĝo, kaj sidigis je la tablo kaj vidis revolveron antaŭ si, plene konvinkita, ke dum tiu ĉi nokto, li tutcerte mortpafus sin mem. Sed – lia travivaĵo kun la knabino tute ŝanĝigis liajn pensojn pri la vivo, la realeco kaj la mondo – kaj ne plu estis sensignifa vivo – ĉu songo aŭ ne?

La knabino savis lian vivon – sekve de la pensoj kaj demandoj kiuj impresis lin forte – li prokrastas mortpafi sin mem.

Aperis tutnova kaj nescribeble mirinda vivo por li. Dum la songo li travivas sian propran memmortigon kaj entombigon sen timo aŭ doloroj, kaj kun brila vivo, kie li movas sin tra la mondospaco kun spirita akompano longe for de la tero. Ĉi tie vivis homoj kiel en la paradizo – amaj, pacaj kaj ĝojaj. Li atendas io, subite li sentas varmigan feliĉegan hejmsenton, li vidas la sunon, kiu subtenas nian teron. Li kaj lia spirita akompano nun

ŝvebas en direkto kontraŭ la tero, kiun li forlasis, kaj nun li sentas grandegan amon al tiu tero. Dum momento li vidas etan konatan figuron antaŭ si: La malgranda, malfeliĉa knabino, kiun mi iam neglektis kaj malakceptis surstrate. Eble tio estis nur songo, sed la sento de la amo de tiuj belecaj estaĵoj al mi, restos por eterne en mia animo.

Subite li vekigis de sia songo kun mirego, sidante en sia fotelo kaj ekvidis la ŝarĝitan revolveron, kiun li tuj forĵetis. Li elektis la vivon. La vivo kaj tero estas mirinda. Jes, vivu, vivu kaj prediku la veron – li kriis.

Amu la homojn – amu vian proksimulon kiel vi mem – estas la tuto, estas ĉio – plia vi ne bezonas.

Literaturo:

Dostojevskij, Fjodor M. Kvin rakontoj:

1. Honesta ŝtelisto (1848);
2. Novjara balo kaj nupto (1848)
3. Knabo ĉe Krista abio (1876);
4. La kampulo Marej (1876)
5. La songo de ridinda homo (1877)

Tradukis el la rusa en esperanton – Grigorij Arosev, Aleksander Korĵenkov.

Kompilis Aleksander Korĵenkov; Kaliningrado: Sezonoj, 2021, 55 p.

Elŝutebla senpage ĉe: <https://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>

Retaj ligiloj al informoj kaj eventoj okaze de la 200-jariĝo de la verkisto:

Ekspozicio:

[https://200yearsdstoevskyanniversary.info/\(dk/eng\)](https://200yearsdstoevskyanniversary.info/(dk/eng))

Biografieto en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Fjodor_Dostojevskij

Biografieto en dana verkista retejo:

<https://forfatterweb.dk/oversigt/zdostojevskij00>

/ Torben Svendsen

Blankaj noktoj de Dostojevskij kun sezona rabato

El Magdeburga Folio

Dostojevskij, Fjodor Miĥajloviĉ.
Blankaj noktoj / Trad. el la rusa
Grigorij Arosev, Aleksej Birjulin,
Aleksander Korĵenkov; Antaŭpar,
koment. Aleksander Korĵenkov. –
Kaliningrado: Sezonoj, 2002. – 448
p. – (Serio Rusa literaturo, Vol. 8).

Okaze de la 200-jariĝo de la naskiĝo de Fjodor Dostojevskij (la 11a de novembro 1821), dum la tuta novembro la libroservo de UEA ofertas lian novelaron Blankaj noktoj kun sezona rabato sendepende de la mendata kvanto.

Ĉi tiu volumo enhavas ses verkojn: Malriĉaj homoj, Sozio, Blankaj noktoj, Honesta ŝtelisto, Misfortuna historio, Noticoj el la kelo. Ilin tradukis Grigorij Arosev, Aleksej Birjulin kaj Aleksander Korĵenkov. Ilin provlegis diversnaciaj Sten Johansson (svedo), Wolfgang Kirschstein (danlanda germano), Alen Kris (ruso), Daniel Luez (franco). La 448-paĝa libro estas malmole bindita kaj provizita per jaketo (kromkovrilo) projektita de Larisa Jakovleva.

200-a datreveno de Fjodor Dostojevskij



Mendu la libron ĉe la libroservo de UEA:
<https://katalogo.uea.org/?inf=6700>

AIKo

Ĉi tiu listo aperis en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto.


Ĉe represo aŭ citado bonvolu indiki la fonton:

La Ondo de Esperanto
<https://sezonoj.ru/2021/11/dostojevskij>

Nova senpaga libro: Kvin rakontoj de Dostojevskij

Hodiaŭ, okaze de la ducenta naskiĝdatreveno de Fjodor Miĥajloviĉ Dostojevskij, naskiĝinta la 11an de novembro (Julie: la 30an de oktobro) 1821, la eldonejo Sezonoj (Kaliningrado, Ruslando) publikigis la bitlibron Kvin rakontoj de Dostojevskij. La 55-paĝa libro, kreita laŭ la normoj "pdf" kaj "ePub", entenas jenajn verkojn de la jubileanto: Honesta ŝtelisto, Novjara balo kaj nupto, Knabo ĉe Krista abio, La kampulo Marej, La sonĝo de ridinda homo. Ilin tradukis Grigorij Arosev kaj Aleksander Korĵenkov.

Ĉi tiuj rakontoj pli frue aperis en libroj de Sezonoj kaj en La Ondo de Esperanto. Ĉe la redaktado de la nuna kolekto estis korektitaj kelkaj mistajpoj kaj tradukeraroj.



La nova bitlibro estas elŝutebla ĉe la virtuala biblioteko de Sezonoj, en kiu nun estas 17 senpagaj kaj du aĉeteblaj libroj kaj kelkaj provnumeroj de La Ondo de Esperanto.

Elŝutu ilin ĉe <https://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>.

AiKo

Legu ankaŭ:

Blankaj noktoj de Dostojevskij kun sesona rabato

<https://sezonoj.ru/2021/11/dostojevskij/>
Ĉi tiu artikolo aperis en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto.

Ĉe represo aŭ citado bonvolu indiki la fonton:
La Ondo de Esperanto
<https://sezonoj.ru/2021/11/dostojevskij-2>

”Malbono ne estas ĉiopova” – ”Ondskan är inte allsmäktig”

de Kalle Kniivilä en ĵurnalo Svenska Dagbladet

Kalle Kniivilä skribis multajn librojn pri la situacio en Rusio. Ili troviĝas ankaŭ en esperanto. Ĉi tiun fojon temas pri la situacio de Belorusio. Mi mallongigis la artikolon, sed vi povas mem legi la tuton uzante la ligilon plej malsupre. Tamen ĝi troviĝas nur svede. /Siv



Dmitrij Strotsev

Premio Tucholsky kaj Dmitry Strotsev

La Sveda Pen donas la Tucholsky-premion al verkisto kiu faris specialajn servojn por parolibereco. La ĉi-jaran premion ricevis la ruslingva belarusa poeto Dmitrij Strotsev, kiu laŭ la premioĵurio estas ”simbolo de la senlacaj poetoj de la revolucio”. La premio estas nomita laŭ Kurt Tucholsky, germana verkisto kiu akre kritikis naziismon. Li estis senigita je sia germana civitaneco en 1933 kaj liaj libroj estis bruligitaj sur brulŝtiparo.

Dmitry Strotsev estas unu el la plej eminentaj poetoj de Belorusio. Li estas persekutata de la belorusaj aŭtoritatoj dum jardekoj, lia eldonejo estis devigita fermiĝi kaj liaj libroj ne plu estas eldonitaj en Belorusio, sed devas esti kontrabanditaj en la landon.

Dum la protesta movado post la pasintjara manipulita prezidant-elekto, la nunaj

Tucholskypriset och Dmitrij Strotsev

Tucholskypriset delas ut av Svenska Pen till en författare som gjort särskilda tjänster för yttrandefriheten. Årets pris gick till den ryskspråkiga belarusa poeten Dmitrij Strotsev, som enligt prisjuryn är ”en symbol för revolutionens oförtröttliga poeter”. Priset har fått sitt namn efter Kurt Tucholsky, en tysk författare som skarpt kritiserade nazismen. Han fråntogs sitt tyska medborgarskap 1933 och hans böcker brändes på bål.

Dmitrij Strotsev är en av Belarus mest framträdande poeter. Han har förföljts av de belarusa myndigheterna i årtionden, hans förlag har tvingats lägga ner och hans böcker ges sedan länge inte ut i Belarus, utan måste smugglas in i landet.

Under proteströrelsen efter förra årets manipulerade presidentval fick Strotsevs

poemoj de Strotsev ricevis grandan atenton en Belorusio.

La poemoj ĉi-jare estas publikigitaj en la sveda sub la titolo "Belarus omkullkastat" (Belorusio renversita). La poemaro kompletigas per lia esearo "Belarus: motståndets konst" (Belorusio: la arto de rezisto), kiu ĉi-jare ankaŭ estis eldonita en sveda traduko.

La teksto estas publikigita en Sydsvenskan la 25-an de novembro 2021, Kalle Kniivilä, <https://www.glasnost.se/?p=13106>


dagsaktuella dikter stor uppmärksamhet i Belarus.

Dikterna har i år getts ut på svenska under titeln "Belarus omkullkastat". Diktsamlingen kompletteras av hans essäsamling "Belarus: motståndets konst", som även den kommit ut i svensk översättning i år.

Texten är publicerad i Sydsvenskan den 25 november 2021, Kalle Kniivilä, <https://www.glasnost.se/?p=13106>

La artklubo en la Konstruelementa uzino Konstklubben på Elementfabriken

de Ingegerd Granat



Mi laboris en la magazeno de la apartament-provizanto Göteborgs Stads Bostads AB kiam mi estis juna. Tie ni zorgis pri mendoj, stokado kaj transportoj.

La fabriko mem produktis murojn, banĉambrojn kaj kuirejojn kaj pli, kiuj estis metotaj sur konstruejojn kaj iĝos pretaj apartamentoj. Tiele ankaŭ fariĝis. En multaj lokoj estas etaĝkonstruaĵoj kiuj estas

Jag arbetade på förrådet på Göteborgs Stads Bostads AB när jag var ung. Där hade vi hand om beställningar, lager och transporter.

Själva fabriken tillverkade väggar, badrum och kök med mera som skulle placeras ut på byggplatser och bli färdiga lägenheter. Det blev det också. På många ställen står hyreshus som är byggda på detta sätt. Husen byggdes i

konstruitaj tiamaniere. La domoj estis konstruitaj en Hammarkullen, Rannebergen, Gårdsten, Eriksbo, Hjällbo kaj pluraj aliaj lokoj en Göteborg.

Kamionoj kun longaj remorkoj transportis murojn kaj "unuojn", kiel la kuirejoj kaj banĉambroj estis nomitaj, al la konstruejo. La elementfabriko estis maldelikata kaj praktika laborejo. Sed estis ankaŭ homoj, kiuj strebis por la molaj valoroj malproksime de la "konkretaj linioj".

La laborestro, maljuna skanio kun furioza temperamento en la sekcio numero tri, kie kuirejoj kaj banĉambroj estis fabrikataj, vendis neĝulojn kaj neĝulinojn kiel kristnaskajn ornamojn por Kristnasko ĉiujare. Li tiam prenis ordonojn. Krome, la fabriko havis aktivan artan asocion, kie mi estis parto de la laborgrupo. La klubo organizis grandan artekspozicion ĉiujare. Ĝi estis pretigita en la kontora areo.

Multaj artistoj partoprenis kaj estis garantiitaj vendi unu el siaj verkoj, kiu tiam estis lotumita ĉe festo. Tiuj kiuj estis membroj de la klubo havis ŝancon gajni.

En kelkaj okazoj mi okupiĝis pri kolektado de pentraĵoj de la artistoj. Estis tre ekscita komisio. Renkontiĝo kun grandaj personecoj kaj diferencaj pentraĵoj. Personaj medioj!

Foje ni devis eltiri pentraĵojn tra la fenestro de la unua etaĝo, ni saltis tra la fenestro! Feliĉe la artisto loĝis en la unua etaĝo kun gazono ekstere.

En tia ekspozicio, mi unuafoje kontaktiĝis kun artisto kun fantazia kaj detala pentraĵo kun multaj koloroj.

Estis Mona Huss Walin, kiu naskiĝis la 24-an de julio 1944 en Stokholmo.

Ŝi havas tre ampleksan meritliston, kiu montras ke ŝi estis tre aktiva en arto kaj ekspozicioj.

La pentraĵo, kiun ŝi vendis al "Konstklubben", estis la jena, kaj bedaŭrinde mi ne gajnis ĝin:

Hammarkullen, Rannebergen, Gårdsten, Eriksbo, Hjällbo med flera platser i Göteborg.

Trailrar transporterade väggar och "unitar", som köken och badrummen kallades, till byggplatsen. Elementfabriken var en grov och praktisk arbetsplats.

Men där fanns också människor som strävade efter de mjuka värdena långt bort från "betonglinjerna".

Förmannen, en äldre skåning med ett häftigt temperament på linje nummer tre, där kök och badrum tillverkades, sålde snögubbar och snögummor som julprydnader till jul varje år. Han tog då beställningar. Dessutom hade fabriken en aktiv konstförening, där jag var med i arbetsgruppen. Klubben anordnade en stor konstutställning varje år. Den hängdes i kontorsdelen.

Många konstnärer deltog och var garanterade att sälja ett av sina verk som sedan utlottades vid en festlighet. De som var medlemmar i klubben hade chans att vinna.

Jag var med och hämtade tavlor vid några tillfällen hos konstnärerna. Det var ett mycket spännande uppdrag. Möte med stora personligheter och annorlunda tavlor. Personliga miljöer!

En gång fick vi ta ut tavlor genom fönstret på förstavåningen, hoppa genom fönstret gjorde vi! Tur att konstnären bodde på förstavåningen med en gräsmatta utanför.

Vid en sådan här utställning kom jag för första gången i kontakt med en konstnärinna med ett fantastiskt och detaljrikt målning med mycket färger.


Det var Mona Huss Walin som föddes den 24 juli 1944 i Stockholm.



Hon har ett mycket omfattande CV som visar att hon varit mycket aktiv inom konst och utställningar.

Tavlan som hon sålde till "Konstklubben" var den här och tyvärr vann inte jag den:



Galerio Mona Huss Walin





Christin rakontis pri sia hundo Tina



en la decembra numero. Tamen Tina ne estis la sola hundo, kiun Christin posedis. Jen vico de ŝiaj aliaj hundoj.

Ni ricevis **Tin-Tin**-on kiam li estis hundido. Ni iris por preni lin ĉe hundbredejo en Hålanda. Li estis "tervuren" (belga paŝtista hundo), kiu havis multajn nomojn. Lia reala nomo estis Pirato de Penzance Debousie. Sed ni renomis lin Tin-Tin. Estis plej facile krei tiun nomon. Tin-Tin devis estis la hundido de Tina por iom da tempo.

Mia onklo Karl-Henry kaj Nora ĉiam volis eliri kun Tin-Tin kiam ili estis vizitantaj. Nora kaj Tin-Tin kutime kune suprenkuris la deklivon. Ĉiufoje kiam Nora venis viziti nin, ŝi ricevis feliĉan bojon de Tin-Tin. Karl-Henry iris longdistancojn kun li. Li zorgis pri ĉiuj matenaj promenoj, kiam li dormis kun ni.

Io malgaja okazis al Tin-Tin iam. Tio estis kiam Anneli, nia amikino Mathilda kaj mi intencis malsupreniri al la ŝafpaŝtejo por viziti tie.

Tin-Tin estis ligita en angulo apude, sed daŭris ne longe antaŭ ol li ankaŭ kuris al la ŝafejo kaj meze de la salto li ŝiris sin sur lignan stangon kaj ŝiris la tendenojn sur unu malantaŭa kruro.

Ni telefonis al bestmalsanulejo Blå Stjärnan kaj ni devis eniri urĝe kun Tin-Tin. Post la unua vizito al Blå Stjärnan, li devis porti funelon, por ke li ne leku la vundon post sia krura operacio.

Tiu funelo estis akra ĉe la randoj sed malgraŭ tio, li estis vigla kaj feliĉa. Do kiam li intencis kuri por saluti homojn, kiuj venis al ni, ili eksentis lian akran funelon kaj ilin tre doloris kiam ili salutis Tin-Tin.

Tin-tin

luj homoj, kiuj ne komprenis, ke li estas feliĉa, pensis, ke li deziras ion malbonan. Sed ne estas tiel facile imagi kiel gasto,



Tin-Tin skaffade vi när han var valp. Vi hämtade honom på en kennel nere i Hålanda. Han var en "tervuren" (belgisk vallhund) som haft många namn. Egentligen hette han Pirate of Penzance Debousie. Men vi döpte om honom till Tin-Tin. Det var lättast att ropa. Tin-Tin fick vara valp för Tina också en tid.

Min morbror Karl-Henry och Nora ville alltid ut och gå med Tin-Tin när dom var på besök. Nora och Tin-Tin sprang oftast ihop i uppförsbacken. Varje gång Nora kom på besök fick hon ett glatt skällande av Tin-Tin. Karl-Henry gick långa sträckor med honom. Han tog hand om alla morgonpromenader när han sov över hos oss.

Det hände något tråkigt med Tin-Tin en gång. Det var när Anneli, våran kompis Mathilda och jag skulle gå ner till fårhagen för att hälsa på där.

Tin-Tin stod bunden i ett hörn i närheten, men det gjorde han inte länge till innan han också skulle springa till fårhagen och mitt i språnget rev han sig på en trä-stolpe och slet upp senorna på ena bakbenet.

Vi ringde till Blå Stjärnan och vi fick åka in akut med Tin-Tin. Efter första besöket på Blå Stjärnan fick han ha en trätt på sig för att han inte skulle slicka upp såret efter hans operation i benet. Den tratten var vass i kanterna plus att han var livlig och glad också. Så när han skulle springa fram och hälsa på folk som kom till oss, så fick dom känna på hans vassa trätt och dom fick väldigt ont när dom hälsade på Tin-Tin.

En del personer som inte fattade att han var glad trodde att han ville något illa. Men det är väl inte så lätt heller att tänka sig som gäst att Tin-Tin var glad när han blev för ivrig i sitt hälsande. När Tin-Tin sprang lös i trädgården hittade han sin egna runda. Vilket var, runt alla berg och på alla svåra leriga stigar

ke Tin-Tin estis gaja kiam li fariĝis tro fervora en sia saluto.

